

El historio de mia Esperanta vivo.

Věra Podhradská

En mia infanaĝo nia familio loĝis en tiama strato Hlinky, nun Mendel-placo. La domo tie situas eĉ nun, kie estas sufiĉe granda trafiko. Do pro tio por mi kaj ceteraj infanoj estis ludejo nia korto kun preterfluanta rivero Ponávka.

Do ĉiuj infanoj el 4 domoj pasis sian liberan tempon sur la korto.

En la sama domo loĝis ankaŭ sinjorino Borská, pensiiĝinta operkantistino, kiu estis bona kaj fama esperantistino, kiu proponis al ni lerni Esperanton. Aliĝis mi kun mia amikino Jarka Novotná–Navrátilová, kaj komencis vizitadi sinjorinon Borská en ŝia loĝejo. Poste ankoraŭ venis Jarka Rybová–Čejková kaj ni trio pe vere diligente lernis Esperanton. Post certa tempo ŝi alvenigis nin en EK Brno. Tio ĉio okazis en la jaro 1950 – 1951. Ĉar nia instruistino estis aktorino, do ŝi krom la instruado allogis nin ankaŭ al poezio, deklamado, rakontado ktp. Tial ni lernis diversajn poemojn, kantojn, unuaktaĵojn ktp., kompreneble, ke parkere kaj poste ni tion prezentis dum programaj vesperoj en la klubo. Ĉiuj tiamaj membroj nin sincere bonvenigis, aplaudis nin, kaj ni poste jam regule ĉiun mardon vizitadis klubon, kaj de tempo al tempo ni prezentadis ĉion, kion al ni lernigis nia instruistino. Post iama tempo nia malgranda grupeto plilarĝiĝis je pluaj interesiĝantoj pri Esperanto, krom lernado estis poste fondita jam konata grupeto Verda masko. Sub gvido de sinjorino Borská ni preparis diversajn programojn, kiujn ni poste prezentadis en la klubo, kaj ankaŭ por la publiko. Ekzemple ni, junulinoj 14-jaraj, prezentis nian programon – kantado de naciaj kantoj en kafejo Alfa, sed ne havis muzikakompanion, do ni petis nian instruiston – de la rusa lingvo, kiu volonte akompanis nin ludante akordeonon. Mi povas diri, ke tio ĉio ankaŭ helpis al mia privata vivo, plejparte en lernejo, ĉar mi ne havis tremon ion prezenti, eĉ ĝis nun. Ŝia motto „Parolu laŭte, kuraĝe kaj elegante“ akompanas min senĉese.

Mi kun Jarka estis tiel emociita pri Esperanto, ke ni jam frue komencis korespondi, helpe de sinjorino Borská, kiu donis niajn adresojn en Heroldo, mia unua korespondanto estis nederlandano, knabo ankaŭ juna. Krom tio ni du preparis tabelon kiun ni donis en la fenestron de t.n. infanĉaretejo, kie ni de tempo al tempo ŝanĝis la bildojn, poŝtkartojn, leterojn, kovertojn kun belegaj poŝtmarkoj ktp. Preskaŭ pro tio, ke estis ne bonaj tempoj, neniam okazis ia nekontento kun nia tabulo.

La 18-an de novembro 1951 okazis en Brno Esperantista festo, nome 50-jara jubileo de Esperanto en Brno. Tiam ni la unuan fojon renkontis esperantistojn el multaj aliaj urboj de nia lando.

La sekvantan jaron mi kaj Jarka N. kun sinjorino Borská partoprenis Esperanto-kolegion en Doksy, kie ni jam partoprenis kurson C por konversacio kaj mi povas diri, ke danke al nia instruistino ni la kurson finis kun bona rezulto kaj mi povas diri, ke ni estis admirataj de pli aĝaj esperantistoj, kion ĉion ni sciis, mi vere estis tiam tre diligenta lernantino. Tie mi konatiĝis kun samaĝulino Květa Jurková–Černá, ni amikiĝis kaj la venontan jaron ni je ŝia rekomendo vizitis nian la unuan Someran Esperanto-tendaron en Žimrovice, kiun organizis junularo el Opava. Tiu tendaro estis skoltstila. Kaj de tiam komenciĝis mia tendarumado. Mi partoprenis pluajn tendarojn,

Chvalatice – Třebíč, Popelná – Šumava, Červená nad Vltavou – Písek, kaj kompreneble Lančov.

Krom tio, ke mi senĉese vizitadis kurson ĉe sinjorino Borská, ni ankaŭ vizitadis junularan grupon en Brno, kiun gvidis sinjorino Drahuška Chlubnová. Tie ni estis en sufiĉe granda nombro. Ĉar multaj junaj esperantistoj, kiuj studis en Brno, aktive partoprenis nian junularan vivon. Ekzemple Jan Werner, Josef Cink, Andreo Valjan, Irena Petrželková kaj aliaj. Mi tute trankvile povas diri, ke nia junularo estis vere aktiva. Ni kunvenadis regule ĉiun ĵaŭdon, kompreneble ni ne forlasis klubajn verperojn. Nia programo estis, progresi en Esperanto, prepari kulturajn programojn por EK Brno, ni ankaŭ amuzis, ludis diversajn ludojn, kantis, komune ekskursis, vizitadis klubajn vesperojn, aktivis en kluba vivo. Kunorganizis diversajn programojn en Brno, ekzemple ĉiujarajn maskobalojn, kiuj okazis en granda salono de hotelo Slovan, kaj kiun vizitadis multaj gesamideanoj – junaj, pli aĝaj en sufiĉe multa nombro. Junularo ĉiam preparis antaŭprogramon - Junularan seminarion, kaj pro tio aliĝintoj havis vojaĝrabaton. En aliaj urboj havis ankaŭ tradiciajn aranĝojn, printempe okazis io ekzemple en Olomouc aŭ Přerov, somere tendaro, aŭtune tradicia interbabilado en Ostrava kaj vintre Nikolaa vespero en Prago kaj kredu, ke ĉiuj tiuj aranĝoj estis vere multe vizitataj.

Kiel mi jam menciis, la junularo preparis diversajn programojn, plejparte en vesperaj programoj en Brno, ĉar esperantistoj en Brno kunvenadis ĉiun mardon. La programoj estis variaj, amuzaj, seriozaj ktp.. ekz. Poeziaj vesperoj, Teatraj fragmentoj, Kristnasko kaj Pasko en la mondo (ni petis niajn korespondantojn, kiel ili festas la kristnaskajn tagojn). Ni ankaŭ prezentis teatraĵojn – Andreo kaj drako – tradukis s-ro Vondroušek – kaj La lasta viro.

Teatraĵon Andreo kaj drako ni preparis sufiĉe longe, ĉar unue ni devis lerni tekstojn, kaj pro tio, ke okazado situis en vilaĝa placo, do ni mem faris kulisojn. Ni simple prizorgis dikan paperon (ondumitan kartonon) kaj tiun situacion mem pentris. La kostumojn ĉiu prizorgis mem. Unu bildo montris vilaĝplacon, eĉ puto tie estis kaj gerolintoj estis vilaĝa junularo, inter ili la knabino Madlenjo – rolis Jarka Navrátilová – preparita, ke ŝin formanĝos la drako. Dua bildo – roko, kie vivis la drako, sed venis brava junulo Andreo, kiu savis Madlenjon kontraŭ drako. Andreon rolis Jan Werner. Ceteraj rolintoj estis Věra Novobilská, Jarka Čejková, mi, Irena Petrželková, Josef Cink, Jaroslav Kaňovský, kaj pluaj – mi jam ne memoras la nomojn.

La teatraĵo havis grandan sukceson, pro tio ni ankaŭ estis invititaj al renkontiĝo en Přerov, kien ni volonte veturis kompreneble kun niaj kulisoj. Tion ĉi mi al vi volis montri, ke vi vidu, kiel nia junularo en Brno amuzis sin. Pli poste gvidis la junularon Martička Lorková – animo de Esperanto-klubo en Brno, ankoraŭ pli poste s-ino Adamcová, fervora esperantistino, komune kun la junularo kaj aliaj klubaj plenkreskuloj daŭrigis similajn programojn. Do mi povas diri, ke EK Brno dediĉis multon al kulturo kiu ankaŭ bone prezentadis Esperanton.

Mi ankaŭ multfoje gastigis esperantistojn el diversaj landoj en mia familio, kvamkam krom mi neniu Esperante parolis.

Sed mi devas konfesi, ke mi pli poste jam ne estis tiel diligenta, ĉar venis aliaj aferoj, ekzemple jam kiel 15-jara mi komencis labori en vestfabriko Kras, kaj mi laboris 8 horojn ĉiutage, eĉ sabate kaj unu semajnon antaŭtagmeze, duan

posttagmeze. Krom tio mi agis en diversaj aliaj aktivecoj, en la fabriko, en sporto, kaj kiel juna mi ankaŭ volis amuziĝi, viziti dancvesperojn ktp. Krom tio mankis al mi libertempo, ĉar mi kiel laboristino havis limitigan libertempon. Mi ankaŭ sopiris rigardi la maron, ekkoni aliajn landojn – kvamkam nur en proksima ĉirkaŭaĵo – Pollando, Hungarujo, Bulgarujo, sed ankaŭ mi sukcesis vojaĝi al Anglujo.


Do pro tio mia antaŭa aktiveco por Esperanto iom pasis. Tio daŭris kelkajn jarojn, sed de la jaro 1969 mi denove reviviĝis por Esperanto. Kaj tio jam estas nova epoko, por hodiaŭ mi finas.

Ankoraŭ mi volas montri al vi kelkajn bildojn pri mia agado kaj iom pri agado en esperantistaro en Brno.



Starantaj viroj de maldekstre: 1. Baláš, 2. Netík, 3 ?, 4. Lelek, 5. Hrubý **Starantaj virinoj de maldekstre:** 6. Podhradská, 7. Navrátilová Jar., 8. Čejková **Sidantaj virinoj de maldekstre:** 9. Borská Věra (gvidantino), 10. Netíková, 11. Dvořáčková Vlasta





Jana Borkovcová

Jan Werner

Sidantoj: Jaroslava Navrátilová-Novotná - Lubor Vondroušek - Věra Podhradská

Starantoj de maldekstre: Josef Cink, Andrej Valjan, František Kopecký, Ludmila Vanková, Milada Vondroušková, Marta Lorková, Jarmila Rybová-Čejková, Františka Fojtíková, Jan Werner, Věra Kořínková-Novobilská, Jana Borkovcová, Oldřich Kaláb, Hana Bachtíková



Marta Lorková

Věra Podhradská



Andrej Valjan
Fanyňka Fojtíková



František Kopecký
Oldřich Kaláb
Věra Podhradská



Lída Vanková

Josef Cink



Věra Kořínková-Novobilská
Jarka Rybová-Čejková



Milada Vondroušková
Jarka Navrátilová-Novotná